

Ludwig Uhland,
La kapelo

*tradukita de Ludwig Lazarus
Zamenhof*

Supre staras sur la monto
La silenta kapeleto,
En la valo, ĉe la fonto
Ĝoje kantas paŝtisteto.

Sonorado, mortkantado
Nun eksonas tra l' silento, -
Haltas knabo en kantado
Kaj aŭskultas kun atento.

En la tombojn de l' monteto
El la valo ĉiu venos.
Ankaŭ vin, ho paŝtisteto,
Oni iam tien prenos.

*Traduko de la Germana poemo
"Die Kapelle" de LUDWIG UH-
LAND (*1787.04.26 - †1862-13-
11) en Esperanton de LUDWIG
LAZARUS ZAMENHOF (Ludovi-
ko Lazaro Zamenhofo, *1859-
12-15 - †1917-04-14).*

Arg-639-1288 (2012-11-02
16:27:28)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas
ankaŭ en [www.literaturo.
dk/kapelo.htm](http://www.literaturo.dk/kapelo.htm), ene de
la listo [http://www.
literaturo.dk/enhavo.htm](http://www.literaturo.dk/enhavo.htm).

Ludwig Uhland,
Die Kapelle

Droben stehet die Kapelle,
Schauet still ins Tal hinab.
Drunten singt bei Wies' und Quelle
Froh und hell der Hirtenknab'.

Traurig tönt des Glocklein nider,
Schauerlich der Leichenchor;
Stille sind die frohen Lieder,
Und der Knabe lauscht empor.

Droben bringt man sie zu Grabe,
Die sich freuten in dem Tal:
Hirtenknabe, Hirtenknabe!
Dir auch singt man dort einmal.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo
estas LUDWIG UHLAND (*1787.04.26 -
†1862-13-11).*

Arg-639-1286 (2012-11-02 16:53:38)

Vidu:[http://meister.igl.
uni-freiburg.de/gedichte/
uhl_103.html](http://meister.igl.uni-freiburg.de/gedichte/uhl_103.html). Pri la poeto vidu la
vikipediejon [http://de.wikipedia.
org/wiki/Ludwig_Uhland](http://de.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland). La
poemo estas kantebla laŭ melo-
dio verkita de Conradin Kreut-
zer. La melodio estas aŭdebla tie:
[http://www.musicanet.org/
robokopp/Lieder/drobenst.html](http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/drobenst.html).

Ludwig Uhland,
La kapelo

*tradukita de Hans-Georg
Kaiser*

Supre tronas sur la monto
La kapelo en kviet'.
En la valherbej' ĉe l' fonto
Ĝoje kantas paŝtknabet'.

Kun funebra sonorilo
Ektimigas mortkantad'.
Finas tuj la ĝojjubilo
De la knabo ĉe l' konstat'.

La ĝojintoj post la morto
Supren en la tombojn venos
Paŝtoknabo, laŭ la sorto,
jen ja Morto vin eĉ prenos.

*Traduko de la Germana poe-
mo "Die Kapelle" de LUD-
WIG UHLAND (*1787.04.26 -
†1862-13-11) en Esperanton de
HANS-GEORG KAISER (Cezar,
1954-05-21).

Arg-639-1290 (2012-11-02
09:10:10)

Tiu ĉi poem-traduko
troviĝas en [http:
//www.cezarpoemtradukoj.
cezarpoezio.de/213.html](http://www.cezarpoemtradukoj.cezarpoezio.de/213.html).